# *Akceptos Raúl Castro la prezidantinon de ?ilio Michelle Bachelet en Havano.*



Havano, 8 jan (RHK) La prezidentino de ?ilio, Michelle Bachelet, dialogos kun la kubaj a?toritatuloj kaj ricevos la honorojn kongruajn al ?ia altranga posteno, dum la akcepto oficiala de la kuba prezidento Raúl Castro.

Bachelet, kiu plenumas sian anta?lastan internacian turniron anta? la fino de sia mandatperiodo, la 11-an de marto, partoprenos entreprenistan forumon kaj dialogos kun gestudentoj kaj laboristoj de la pedagogia lernejo Salvador Allende.

?i anka? partoprenis la subskribon de interkonsento inter la nacia konsilantaro de kulturo kaj la artoj de ?ilio kaj la kuba instituto de arto kaj kinematografia industrio, flanke de la prezidanto de la institucio Roberto Smith kaj la ambasadoro de ?ilio en Kubo, Ricardo Herrera.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/152075-akceptos-raul-castro-la-prezidantinon-de-cilio-michelle-bachelet-en-havano

**Radio Habana Cuba**